

la 30<sup>an</sup> de Aprilo 1929

Kara Amiko,

Vi rimarkigas al mi en via letero de la 28<sup>a</sup> de Marto ke estas la unua fojo ke vi uzis ĉi-tiun titolon. Sed mi jam rimarkis tion de longe. Mi ofte metas ĝin sed vi restis ĉiam en la oficiala protokolo!!!

Tamen amikeco estas bela laŭdinda sento + ne estas ĉiuj kiuj povas ricevi aŭ kompreni ĝin.

Vi rimarkigas ankaŭ ke ni korespondadas de 9 jaroj.... iom interrompitaj pro viaj longaj silentoj, ĉu ne? Sed la amikeco povas daŭri malgraŭ la ĉesado de leteroj, laŭ kelkaj. Sed tiuj kelkaj estas ĉiam personoj kiuj mem ne skribas ĉu pro mallaboremo, ĉu pro granda okupo, ĉu pro ĉeso de nova entuziasmo. Mi opinias ke kutime kiam ĝi ĉesas estas ĉar la fajero<sup>1</sup> de noveco, de sorĉeco, de entuziasmo ne plu ekzistas. Tiel ofte la homoj ŝatas tion kio estas nekonata, mistera, nova.

Efektive, vi bele priskribis vian 300 jaran historion. Mi havas ankoraŭ la leterojn. Sed mi ne plu scias kion mi tiel "sprite" (kiel vi diras) respondis. Vi aldonas: belaj rememoroj. Sed, se tio dependus de mi, tio ne estus rememoroj - tio estus nunaj samaj faktoj en ĉiamaj leteroj. Vi ĉesis, ne plendu.

Mi ricevis kun tre granda plezuro vian P.K. el Pardubice. Mi rekonas GeS<sup>roj</sup>n Berger, Kamaryt + al mi ŝajnas ke mi jam vidis Hromada + Sklenĉka. Vi estas tre rekonebla kiel kutime. Ĉu tiu foto estis dum la malvarmegaj tagoj?

Kiel ŝatus mi partopreni kongreseton kiel tiu en Pardubice meze de simpatiaj Ĉekoj! Antaŭe kiam la internaciaj Kongresoj estis malmulte grandaj, ili estis pli ĝueblaj + agrablaj. La antaŭaj kongresoj en urboj proksimaj de tiu de la granda kongreso estas ankaŭ tre intimaj. Ekz: tiu en Salzburg en 1924 en unu hotelo kie mi estis + D<sup>ro</sup> Broder ankaŭ kun 150 Esp. estis tute rememorebla.

La skarlatino estas grava malsano, eĉ danĝera ĉe Angloj (estas strange kiel ili estas ĉiam pli grave malsanaj ol aliaj nacioj en ĉi tiu skarlatino) + mi plendas<sup>2</sup> vian Eveton. Mia filo jam aĝa faris tiun malsanon antaŭ 3 jaroj. La koro<sup>3</sup> estis iom dika poste. Nun li estas tute sana + lia juna + tre ĉarma edzino naskis fileton antaŭ 17 tagoj - nomita Claude.

Mi bedaŭras ke mi ne aŭdis D<sup>ron</sup> Beneš en la radio - sed mi ne sciis.

Mi ne komprenas ke vi ne bone aŭdas "Radio Paris" kiu estas la plej forta. La anoncanto "Radiolo" (S<sup>ro</sup> Gaudette) havas tiel bonan voĉon + estas vera oratoro. Mi vespermanĝis kun li sidita apud li, la lastan jaron + antaŭ unu semajnon<sup>4</sup> mi de nove estis kun li en Boulogne kien li venis por fari paroladon. Li estas tiel lerta: du foje Doktoro - scienco + literaturo + leĝo scienco. Li konas 6 lingvojn estas poeto, komponisto + pentristo.

Mi ne bone aŭdas Praha, Buda Pest, Warszawa, Moskva. Zagreb havas tro malgrandajn ondojn. El Bruselo ĉiu sabate + ĉu lunde la disaŭdo estas tre forta + je la 22<sup>a</sup> ĉiu sabate oni parolas Esp.

Mi ŝatus + ne ŝatus iri Budapeston. Mi devus iri sola + mi timas tiun longan vojaĝon. Mi rememoras Wien en 1924. Mi vidas ke U.E.A. faras aranĝojn kiel l'agentejo "Cook" priokupiĝante pri ĉio. Tio estas tre agrabla.

---

<sup>1</sup> ĉu "fajrero" ?

<sup>2</sup> ĉu "bedaŭras" ? (kiel estas skribite per blua krajono)

<sup>3</sup> ĉu "korpo" ?

<sup>4</sup> ĉu "semajno" ?

Nun, amiko kara, mi forlasas vin rememorigante nian belan korespondon + agrablajn momentojn kune. Mi jam vidis vin en 3 grandaj urboj nun: Praha, Wien + Antverpeno.

Ĝis la revido - amika manpremo + tut'kore via,

Alice Sergeant